Tweemaandelijks tijdschrift
Vlaamse Esperantobond

Dumonata revuo
Flandra Esperanto-Ligo

Boekendienst . Libroservo

# LIBROVERMETO

verantwoord. uitgever: E., D'Hondt Wilgstr. 25A
respondeca eldonanto : 9440 EREMBODEGEM - AALST

Jarkolekto - Jaargang n° 2 (5) mei-juni 85

Vivanta lingvo estas suka instrumento, kiu taŭgas por esprimi ĉion ajn. Oni per ĝi kapablas krii, diskuti kaj disputi, karesi kaj vipi, blasfemi kaj mensogi, rideti kaj ridegi, ŝerci kaj seriozi.

Precipe pri la ŝercado ni hodiaŭ volas paroleti. Plej taŭgan ŝercadon oni atingas per vortludoj. Nia plej konata tia ĵonglisto estas ekster iu dubo:

## Raymond Schwartz

Li fabrikis centojn da tiaĵoj, kaj verkis verajn juveletojn en tiu arto. Neniu antaŭ li povis eĉ eksupozeti ke nia lingvo - kiu ja iel celis unusencecon en sia vortaro - permesus tian abundecon de ... du(b)sencaĵoj. Kaj ... ofte li sukcesis eĉ rilatigi ilin al la politika aktualeco. Por juĝi tion legu, se vi ankoraŭ ie ĝin trovos, lian **"El mia ridpunkto..."**, kiu reprenas grandan parton de liaj ĉiujaraj raportoj el Sennacieca Revuo.

Sed ni iom rakontu eble pri la personeco de la aŭtoro. Raymond Schwartz naskiĝis en 1894. Li havis dulingvan edukadon: francan kaj germanan. Li esperantiĝis kiel 15-jara gimnaziano. En la movado li estis ĉefe

konata pro sia fondado kaj funkciigo de Esperantaj kabaretoj. Unue de 1920 ĝis 1926 en "La Verda Kato" kaj duafoje inter 1949 kaj 1956 en la "Tri Koboldoj". El tiu aktiveco fontas kelkaj libretoj kun spritaj skecoj: **"La Verdkata Testamento"** kaj **"La ĝoja Podio"**. Malgraŭ ke ili estas porkabaretaj tekstoj tamen la plejparto de ili restas ĝueblaj kaj neniam tuŝas la limojn de vulgareco.

Lia lingvo plene eluzas la vortludajn latentojn de Esperanto, konsistantajn el dusencaj esprimaĵoj, komikaj pseŭdo-sufiksado kaj sinonimado.
Li mortis en 1973, estante 79-jara.

Verkoj

Liaj versaj verkoj **"Verdkata Testamento"** (1926) kaj **"La Stranga Butiko"** (1931) estas plenaj de la sukaj fruktoj de lia kurioza fantazio: kanzonoj laŭ kabareta stilo, ironia prezento de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, akre trafaj kaj milde pikaj observoj, spritaj vortludoj.

La samaj kvalitoj distingas liajn prozajn skizojn, aperintajn en la **"Prozo Ridetanta"** (1928).

Lia mallonga romano **"Anni kaj Montmartre"** (1930), rakontinta la danĝerajn aventurojn de naiva germana knabino, delogita, trompita, forlasita en Parizo, estas unu el niaj plej plezure legeblaj originalaĵoj. En ĝi mankas ĉiu sentimentala siropo aŭ gravmiena moralprediko kaj la akre trafa karakterizo, simpla, natura prezentmaniero kaj interesa templekto ĝin faras vere eta ĉefverko.


En 1963 aperis lia granda romano **"Kiel Akvo de l'Rivero"**. Temas pri famili-generacia romano,parte aŭtobiografia, kiu prezentas trafan analizon de karakteroj kaj sinsekvon de eventoj. Lia rakonto estas tute kredebla, lia partopreno estas varma kaj simpatiplena. Tiu verko prezentas sian aŭtoron kiel maturan verkiston, trafe observokapablan.

Novelaro el 1920-70 aperis en 1971 en la volumo **"Vole ...Novele"**.

Ĵus aperis:

VORTARETO - WOORDENBOEKJE LA KOMENCANTO

Dudirekta vortareto Nederlanda - Esperanta kaj Esperanta - Nederlanda kun la vortoj de La Komencanto.
La vortareto ankaŭ enhavas la sufiksojn kaj korelativojn. Eldonis La Pioniro Aalst
50 p.- Mimeo - 29 cm - Prezo: 100 F



KOMPUTILISTOJ

Bona novaĵo por vi : speciale por la posedantoj de Commodore 64 ni kompilis Esperantan programon por testi vian aktivan konon de 1500 bazaj vortoj.
La programo ne stulte mezuras vian scion, sed devigas vin samtempe plibonigi ĝin, vere instruas vin!
Prezo (inkluzive la bendon) : 200 F (sen sendokostoj)

Se ekzistas plia interesiĝo ni pretas konverti kaj adapti la programon al pli ĝenerala Basic-lingvo, uzebla en plejmulto de la kutimaj komputiloj.
Skribu al la respondeca eldonanto kaj ni zorgos ke viaj deziroj plenumiĝos.

PRISMA VORTARO

La eldonejo Prisma sciigis al ni ke la eldono de la vortaro de Middelkoop prokrastiĝis pro malglata funkciado de korektejo kaj kompilejo. Oni promesis (???) ke ĝi estos preta je la fino de 1985 !!!
Do iom da pacienco!!!

ALVOKO AŬKCIO

Ni jam ricevis multajn donacojn por nia aŭkcio (verŝajne en la septembra Librovermeto). Multan dankon al ĉiuj.
Se vi trovis en via hejmo por vi ne-interesajn aĵojn, ne nepre Esperantaĵojn, kiuj povas interesi aliajn,telefonu al ni kaj ni zorgos por la transporto de ĉiuj viaj donacoj.



KROKODILKARTOJ

Ne forgesu niajn unikajn, belajn, multkolorajn, allogajn, profesinivelajn,malmultekostajn bildkartojn pri la temo : "NE KROKODILU !"
Sendante ilin al eksterlandaj samidean(in)oj vi akiros moralajn meritojn pro via agado kaj financajn profitojn por FEL.
La prezo estas 50 F(serio de 6 diversaj kartoj) por FEL-membroj kaj 60 F por ne-membroj. Se vi aĉetos minimume 10 seriojn vi ĝuos rabaton de 33 % je la sumo de 60 F.